## MIAJ ALDONAJ VORTOJ AL LIA PAROLADO

Niaj karaj aŭskultantoj. .....

Mi nun kuraĝas publikigi la ardan parolon de nia estimata Pioniro S-ro T. Huĉida kiu ĉiam preĝis kaj bataladis por la paco de la mondo, utiligante nian karan lingvon, ESPERANTO. Ĉar li firme kredis ke la ESPERANTO ja estas la unua Sankta Batalilo por gajni la celon.

Li ĉiam servis por propagandi nian lingvon kaj malfermis kursojn ĉie kie li laboris sub la membreco de YMCA. Oni jam ne povas kalkuli kiom da fojoj li faris la kursojn kaj kiom da personoj li gvidis ?

Sed ni klare povas aserti ke lia arda AMO por la mondpaco eterne vivas en la koro de multegaj gviditoj liaj kaj ni liaj amikoj ! Kaj mi ja estas unu el ili, mi jam ne povas resti silente pri lia arda kaj pozitiva volo por plenumi sian celon !

Karaj aŭskultantoj !

Mi kore petas ke vi bonvole ĉerpu la signifon de lia profunda AMO al la mondpaco kaj preterlasu grandanime kelkajn gramatikajn erarojn en lia parolado.

Kiam ajn mi tuŝas lian koron pere de la aŭskultado de la disketo, mi sentas kvazaŭ estus parolanta rekte kun li !

Lia spirito eterne estu kun ni. .....

Eldoninto, lia amiko,

K. Matubara

# La parolado de nia pioniro, S-ro T. Huĉida

Karaj kaj estimataj gekongresanoj !

Al mi estas granda ĝojo kaj honoro ke mi povas stari ĉi tie kaj klarigi al vi mian opinion kaj peti vian varman aprobon. Mi parolas al vi kiel la reprezentanto de "Semo", kiu estas la Societo Esperanta de Mondfederacioj. Niaj karaj kaj estimataj antaŭuloj laboradis sindoneme, kuraĝe kaj esperante por propagandi kaj disvastigi ĝin por atingi la Sanktan Celon plej baldaŭ.

Ni la postuloj ankaŭ alte tenas la verdan standardon, kaj eĉ kun fiero portadas verdan stelon, insignon, kaj laboradas por la Sankta Celo. Sed kiel vi ĉiuj scias, al

nia granda bedauro la mondpaco ne realiĝas, kaj ĝi staras ankoraŭ malprokisime, ĉu ne ! Kaj mi pensas ke neniu el ni povus havi la memfidon, ke la mondpaco nepre realiĝos post ne loge. Ĉu mi eraras ?

Kiel vi scias, nuntempe troviĝas sur la tero sufiĉe multaj kaj diversaj pacmovadoj. Verdire la popoloj ĉiuj sopiradas kaj aviadas la veran pacon. Sed mi povas diri ke inter tiuj pacmovadoj troviĝas eĉ malpaco, kaj aŭ la ĝermo de milito, ĉu ne ?

Estas stranga kaj malĝoinda afero ! Preskaŭ ĉiuj esperantistoj kredis kaj kredas ke la mondpaco nepre realiĝos, kiam nia kara lingvo Esperanto estos disvastigata kaj uzata kiel la internacia lingvo en la mondo. Sed kiam tio efektiviĝos ! ?

Ĉu vere nia revo efektiviĝos baldaŭ ? Ne ! Bedaŭrinde ! Mi ne povas diri, jes, ĉu ne ! Sed tamen, kiel vi ĉiuj scias bone, se iam okaziĝos mondmilito venontafoje, ĝi nepre estos la teruraga nuklea milito ! Kaj post kelkaj tagoj de la komenco de la milito la plej parto de la homaro sur la tero kredeble formortos, kaj preskaŭ tuta kulturaĵo de la homaro en la mondo, nepre pereos for !

Kaj tial ni nenie kaj neniam devas permesi la mondmiliton, kaj per nia tuta forto energie, sindonema kaj unuanime devas laboradi por starigi veran mondpacon sur la tero, tiel mi kredas.

Nu ! La movado de la mondfederacio ankoraŭ celas veran mondpacon.

Ĝi ja celas efektivi-(gi) senmilitan mondon, kie oni ne bezonas militi, batali, nek povas militi inter nacioj.

Klarigi pli detale pri la ideo kaj la movado aŭ nuna stato de mondfederacio, mi ne havas sufican tempon,(sed)tamen mi povas diri, ke ĝi estas plej efika kaj facile realigebla rimedo neniigi la militon sur la tero, sed al mia granda bedaŭro, esperantistoj kaj mondfederacistoj ne bone komprenas unuj al la aliaj, kaj preskaŭ ne ekzistas kunlaborado inter ĉi tiuj du internaciaj pacmovadoj. Kaj tial mi lastan jaron organiĝis la Societon Esperentan de Mondfederacistoj, mallongite "Semo". Mi tute kore esperas, ke tiu ĉi "Semo" estu la Semo de vera mondpaco !

Karaj ĉeestantoj ! Mi elkore kaj arde petas vin ĉiujn ke vi bone komprenu la movadon de la mondfederacio, kaj se vi volus kunlabori kun ĝi, bonvolu aliĝi al nia "semo", mi petas !

Se multaj esperantistoj aliĝus al mondfederacio, kaj mondfederacistoj utilus nian lingvon, Esperanton, nia celo multe progresos kaj ni povos atingi al nia Sankta Celo plej baldau.

Mi kore dankas vian aŭskulton kaj antaŭdankas vian kunlaboron kaj helpon !

Dankon ! ..... Aplaŭdo .....